

Guilherme Fians

Prezento de la Temoj

Antropologio: Mi studis Sociajn Sciencojn (Antropologio, Sociologio kaj Politika Scienco) en mia bakalaŭro, faris magistran kurson pri Socia Antropologio, kaj nuntempe doktoriĝas pri la sama fako. En tiu prelego, mi parolos pri la studo de homoj kaj de sociaj grupoj, pri la (malbona) rolo de antropologio dum la koloniado de afrikaj landoj, kaj kiel la antropologoj nuntempe provas rekrei sian profesion. Per antropologio, oni povas studi religion, politikon, lingvojn, urban vivon, indiĝenaj popoloj, ktp. La antropologoj forlasis sian koloniantan pozicion kaj pli kaj pli provas alproksimiĝi al la ideoj kaj valoroj de tiuj kiujn ili studas. Nuntempe, estas proksima rilato inter sociologio kaj antropologio. La diferenco inter ambaŭ temas ĉefe pri kiel studi siajn objektojn. Ĉar mia nuntempa esploro temas pri la Esperanto-movado, mi ankaŭ povus paroli iom pri ĝi laŭ la socia vidpunkto.

Brazilo: Brazilo estas la kvina plej granda lando laŭ tersurfaco kaj ankaŭ unu el la plej popolaj en la mondo. Bazita sur miaj konoj pri ĝia historio kaj pri mia persona sperto kiel brazilano, mia prelego temos pri enkonduko al la historio de Brazilo (de la alveno de la portugala koloniantoj ĝis la nuntempaj manifestacioj kontraŭ la nekonstitucia registaro), geografiaj kaj sociaj aspektoj de ĝi (fotoj kaj klarigoj pri Amazonio, Rio de Janeiro, la konstruado de la nova ĉefurbo nomata Brasília en 1960, la socia malegaleco, la rilatoj inter landoj en Latinameriko) kaj ĝia kulturo (muzikstiloj, dancoj, la graveco de sporto, ĉefe futbalo, en ĝia historio, la pluraj roloj de eŭropanoj, afrikanoj kaj indiĝenaj popoloj en ĝia historio kaj kulturo). Mia prelego estos superrigardo pri Brazilo ĝenerale, en neformala, facile komprenebla (kaj, espereble, sufiĉe interesa) maniero. Mi ankaŭ povas paroli iom pri la Esperanto-movado en Brazilo, ĉefe pri ĝia rilato kun la religio nomata Spiritismo kaj pri la oficiala subteno de la Brazila Spiritisma Federacio al Esperanto.